



## **ALBERT CALMETTE (1866-1933)**

**Francouzský bakteriolog, člen Francouzské akademie věd,  
vynálezce protituberkulózního séra.**

**Kalmetizace (povinné očkování proti TBC)**

**je navždy spojena s jeho jménem.**

**Hovořil i psal dokonale esperantem.**

**Na 24. Světovém esp. kongresu v Paříži v r. 1932  
provázel účastníky Pasteurovým ústavem, jehož byl ředitelem.**

***Franca bakteriologo, membro de Franca Akademio de Sciencoj,  
eltrovinto de kontraŭtuberkuloza serumo.***

***Kalmetigo (devontiga vakcinado kontraŭ tuberkulozo)***

***estas por ĉiam ligita kun lia nomo.***

***Li parolis kaj skribis perfekte Esperante.***

***Dum al 24-a Universala Kongreso en Parizo en 1932***

***li gvidis partoprenantojn tra Instituto de Pasteur, kiun li estris.***



## **ALFRED HERMANN FRIED (1864-1921)**

**Rakouský spisovatel a pacifista,  
nositel Nobelovy ceny míru za r. 1911.**

**Esperanto se naučil v r. 1900,  
účastnil se aktivně Světových kongresů,  
spolupracoval s časopisem "L'espérantiste",  
byl autorem učebnice a slovníku.**

***Aŭstra verkisto kaj pacifisto,  
laŭreato de Nobelpremio pri paco en 1911.  
Esperanton li ellernis en 1900,  
aktive partoprenis Universalajn Kongresojn,  
kunlaboris kun la gazeto "L'espérantiste",  
li estis aŭtoro de lernolibro kaj vortaro.***



## DANIEL BOVET (1907-1992)

Italský farmakolog, nositel Nobelovy ceny  
za fyziologii a lékařství v r. 1957.

Byl jedním z prvních rodilých mluvčích esperanta.


Jeho otcem byl Pierre Bovet, ředitel  
Rousseauova Pedagogického institutu v Ženevě  
a aktivní esperantista.

*Itala farmakologo, laŭreato de Nobelpremio  
pri fiziologio kaj medicino en 1957.*

*Li estis unu el la unuaj denaskaj Esperanto-parolantoj.*

*Lia patro estis Pierre Bovet, direktoro  
de Pedagogia Instituto de Rousseau en Ĝenevo  
kaj aktiva esperantisto.*





## LINUS PAULING (1901-1994)

Americký kvantový chemik a biochemik,  
údajně největší chemik 20. století,  
nositel Nobelovy ceny za chemii  
a Nobelovy ceny míru (za kampaň proti experimentům  
s jadernými zbraněmi).

Esperanto se naučil v 15 letech a jeho znalost  
si prokazatelně udržel až do vysokého věku.

*Usona kvanka kemiisto kaj biokemiisto,  
onidire la plej granda kemiisto de la 20-a jarcento,  
laŭreato de Nobelpremioj pri kemio  
kaj pri paco (pro lia kampanjo kontraŭ eksperimentoj  
kun nukleaj armiloj).*

*Esperanton li ellernis kiel 15-jarulo kaj ĝian konon  
li pruveble tenis ĝis alta aĝo.*



## BERTALAN FARKAS (1949-)

První maďarský kosmonaut  
a první esperantista, který vstoupil do vesmíru  
Dle jeho slov "Esperanto je jedním z největších vynálezů světa  
- má perspektivu a stojí za to se ho učit."

*La unua hungara kosmonaŭto  
kaj la unua esperantisto, kiu eniris universon.  
Laŭ liaj vortoj "Esperanto estas unu el la plej grandaj inventaĵoj  
de la mondo - ĝi havas perspektivon kaj valoras lerni ĝin".*



## SUSAN POLGÁR (1969-)

Šachová velmistryně maďarského původu.  
Stejně jako její dvě sestry je rodilou mluvčí esperanta.  
Jejich otec považoval tento jazyk za účinný prostředek  
pro zlepšení inteligence a logického myšlení.

*Hungardevena ŝakgrandmajstrino.  
Same kiel ŝiaj du fratinoj ŝi estas denaska Esperantoparolanto.  
Ilia patro konsideris tiun ĉi lingvon efika rimedo  
por plibonigo de inteligenteco kaj de logika pensado.*





## **FRANZ JONAS (1899-1974)**

**V letech 1965-1974 prezident Rakouska.**

**Esperanto se naučil v r. 1922 a aktivně působil v hnutí, vedl kurzy, vydával časopis "La Socialisto".**

**Jako starosta Vídně v 60. letech navštívil Klub esperantistů v Praze, jako prezident často a ochotně přijímal esp. delegace.**

**Pod jeho záštitou proběhl Světový kongres esperanta ve Vídni v r. 1970.**

*En la jaroj 1965-1974 prezidento de Aŭstrio.*

*Esperanton li ellernis en 1922 kaj aktivis en la movado, gvidis kursojn, eldonis la gazeton "La Socialisto".*

*En la 1960-aj jaroj kiel urbestro de Vieno vizitis Klubon de esperantistoj en Prago, kiel prezidento ofte kaj volonte akceptis Esperanto-delegaciojn.*

*Sub lia alta protekto okazis Universala Kongreso de Esperanto en Vieno en 1970.*




## **JOSIP BROZ-TITO (1892-1980)**

**Dlouholetý prezident bývalé Jugoslávie.  
Esperanto se naučil v r. 1915 v zajateckém táboře.  
Za jeho působení mělo esperantské hnutí  
i výuka na školách v jeho zemi zřetelnou podporu.  
Byl hlavní záštitou Světových kongresů esperanta  
v r. 1953 v Záhřebu a v r. 1973 v Bělehradu.**

***Longjara prezidento de eksa Jugoslavio.  
Li lernis Esperanton en 1915 en militkaptitejo.  
Dum lia prezidanteco Esperanto-movado kaj instruado en lernejoj  
en lia lando havis videblan subtenon.  
Li estis Alta Protektanto de Universalaj Kongresoj  
en 1953 en Zagrebo kaj en 1973 en Beogrado.***





## LEV NIKOLAJEVIČ TOLSTOJ (1828 -1901)

Významný ruský spisovatel a filozof.

Dle svých slov se základy esperanta naučil v r. 1889  
během několika hodin.

Byl otevřeným příznivcem jazyka a jeho myšlenky;  
dal souhlas k překladům svých děl,  
byl čestným členem několika esperantských organizací.

*Elstara rusa verkisto kaj filozofo.*

*Laŭ siaj vortoj lia lernis bazon de Esperanto en 1889  
dum kelkaj horoj.*

*Li estis malferma favoranto de la lingvo kaj de ĝia ideo;*

*li donis konsenton por tradukoj de siaj verkoj,*

*li estis honora membro de pluraj Esperanto-organizoj.*


## JULES VERNE (1828-1905)

Zakladatel vědeckofantastické literatury.

S esperantem seznámil a nadchl se pro ně asi 2 roky před svou smrtí. Ve svém městě Amiens inicioval založení esperantského klubu a byl jmenován jeho čestným předsedou.

*Fondinto de sciencfikcia literaturo.*

*Li konatiĝis kun Esperanto kaj entuziasmiĝis pro ĝi ĉ. 2 jarojn antaŭ sia morto. En sia urbo Amiens li inciatas fondon de Esperanto-klubo kaj estis nomumita ĝia honora prezidanto.*





V jeho posledním nedokončeném románu "*Voyage d'étude*" (Výzkumná cesta) hraje esperanto svou roli. Původní nezměněný Verneův rukopis byl vydán až v r. 2010 v Itálii ve francouzsko-italsko-esperantské verzi; nakladatelství KAVA-PECH nyní připravuje i vydání v češtině.

*En lia lasta nefinita romano „Voyage d'étude“ (Esplorvojaĝo) Esperanto ludas sian rolon. La origina neŝanĝita manuskripto de Verne estis eldonita kaj nur en 2010 en Italio, en franca-itala-esperanta versio; la eldonejo KAVA-PECH nun preparas eldonon en la ĉeĥa lingvo.*





## MARTIN BENKA (1888-1971)

Slovenský akademický malíř a národní umělec, zakladatel moderního slovenského projevu v malbě a kresbě. Aktivně ovládal jazyk esperanto, mj. namaloval série pohlednic s texty v esperantu nebo na motivy esperanta.

Napsal v něm studii "*O slovenském umění*" a povídky "*Kapka vody*", "*Rudé karafiáty*" a "*Podivný koncert*". Jméno Martina Benky nese esperantský klub v Martině, kde se rovněž nachází jeho muzeum.

*Slovaka akademia pentristo kaj nacia artisto,  
fondinto de la moderna slovaka vidarta esprimiĝo.  
Li aktive regis la lingvon Esperanto, li pentris seriojn de poŝtkartoj  
kun tekstoj en Esperanto aŭ kun motivoj de Esperanto.  
Li verkis en ĝi studon "Pri slovaka arto" kaj rakontojn  
"La akvoguteto", "Ruĝaj diantoj" kaj "Stranga koncerto".  
La nomon de Martin Benka portas Esperanto-klubo  
en la urbo Martin, kie troviĝas ankaŭ lia muzeo.*



## JAROSLAV JEŽEK (1906-1942)

Známý český jazzový skladatel, autor nesmrtelných melodií ke hrám Osvobozeného divadla Voskovce a Wericha.

V r. 1924 v Klárově ústavu pro slepce v Praze absolvoval u Vuka Echtnera kurz esperanta.

Překlad jeho písně "Život je jen náhoda" patří k velmi oblíbeným nejen na tuzemských esperantských akcích.

*Konata ĉeĥa ĵazkomponisto, aŭtoro de senmortaj melodioj al teatraĵoj de la Liberigita Teatro de Voskovec kaj Werich.*

*En 1924 en la Klar-Instituto por blinduloj e Prago li finis Esperanto-kurson ĉe Vuk Echtner. Traduko de lia kanto*

*"Nur hazardo estas viv'" apartenas al tre ŝatataj ne nur dum enlandaj Esperanto-aranĝoj.*

## **PETR GINZ (1928-1944)**

**Mimořádně nadaný český chlapec ze smíšené židovské rodiny, rodilý mluvčí esperanta. Za války v terezínském ghettu založil a redigoval výborný dětský časopis "Vedem", v 16 letech zahynul v plynové komoře v Osvětimi.**

**Jeho kresba „Měsíční krajina“ se stala symbolem holocaustu a 16. 1. 2003 vzlétla do vesmíru na palubě amerického raketoplánu Columbia. Ten při zpáteční cestě na Zemi shořel v atmosféře. Tragédie, kterou žádný člen posádky nepřežil, se odehrála 1. února 2003 - v den Petrových narozenin.**

***Eksterordinare talentita ĉeĥa knabo el miksita juda familio, denaska Esperantoparolanto.***

***Dum la milito en geto de Terezín li fondis kaj redaktis bonegan infanan gazeton "Vedem", kiel 16jara li pereis en gaskamero en Aŭŝvico.***

***Lia desegnaĵo „Lunpejzaĝo“ fariĝis simbolo de holokaŭsto kaj la 16-an de januaro 2003 ekflugis al kosmo en la usona raketaviadilo Columbia. Revenvoje al la Tero la raketaviadilo forbrulis en atmosfero. La tragedio, kiun transvivis neniu membro de la anaro, okazis la 1-an de februaro 2003 – dum la naskiĝtago de Petro.***



31  
Kč


EMISCE 2009 V FAJ



MĚSÍČNÍ KRAJINA  
TEREZÍN  
1942-1944

PETR GINZ  
[1928-1944]

ČESKÁ REPUBLIKA



## **NITOBE INAZO (1862-1933)**

**Zástupce generálního tajemníka Ligy národů (předchůdce OSN),  
v r. 1921 se zúčastnil jako oficiální pozorovatel  
13. Světového kongresu esperanta v Praze.**

**Napsal o něm pro LN velmi příznivou zprávu  
a předložil k hlasování návrh o zařazení esperanta jako jednoho  
z pracovních jazyků organizace. Pro hlasovalo 10 delegátů,  
ale z důvodu vetování Francií tehdy návrh neprošel.**

**Byl doživotním nadšeným podporovatelem esperanta.  
Jeho jméno nese Nitobeho centrum pro jazykovou demokracii.**

***Asista ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj (antaŭulo de UN),  
en 1921 kiel oficiala observanto partoprenis  
la 13-an Universalan Kongreson de Esperanto en Prago.***

***Por LN li skribis pri ĝi tre favoran raporton kaj prezentis  
por voĉdonado proponon pri envicigo de Esperanto kiel unu  
el la laborlingvoj de la organizo. Por voĉdonis 10 delegitoj,  
sed pro veto rajto de Francio la propono ne estis akceptita.***

***Li estis dumviva fervora subtenanto de Esperanto.***

***Lian nomon portas Nitobe-Centro por Lingva Demokratio.***